# *Denuncas Lavrov preparon de nova ukraina provoko*



Moskvo, 17 dec (RHK) La rusa  ministro pri eksteraj aferoj, Serguei Lavrov denuncis la preparon flanke de Kiev, pri provoko en Krimeo por tiu ?i jarfino, dum neglektis la eblecon de konflikto inter sia lando kaj Ukrainio.

Por la lastaj 10 tagoj de la jaro, la ukraina prezidento, Piotro Poroshenko, planas militan provokon en la landlimo de Rusio, en la limo de Krimeo, deklaris Lavrov.

Moskvo respondos solide al Kievo, kaze de agadoj provokaj, li promesis.

Temas pri  nia lando, nia landlimo kaj neniel ni permesos ke Poroshenko klopodu, kiel li asertas, defendi siajn interesojn, kaj tiamaniere, perforti la rajtojn de la krimeanoj, atingitaj kongrue al la internacia juro, li aldonis.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/179049-denuncas-lavrov-preparon-de-nova-ukraina-provoko](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/179049-denuncas-lavrov-preparon-de-nova-ukraina-provoko)

# Radio Habana Cuba